

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 262

MAJO 2015

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48

ivnicolas@sfr.fr

Abon-kotizo : 8 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers



ASSEMBLÉE GÉNÉRALE à BRICQUEBEC LE 20 JUIN AUX COULEURS DE LA CHINE !!!

Depuis quelques années, l'Assemblée Générale de notre association normande consacre peu de temps à la réunion plénière même. Deux heures, tout au plus et menées tambour battant, pour faire le point sur la parution du bulletin, notre santé budgétaire et le renouvellement du Conseil d'Administration. Nous préférons cela à de longues discussions soporifiques... et notre association ne s'en porte pas plus mal !

Car l'essentiel est ailleurs, autour de repas conviviaux et de conférences intéressantes.

Rappelez-vous. L'an dernier, nous avons reçu une coréenne et des russes épatants qui étaient intervenus sur des thèmes éducatifs et culturels. Et qui pourrait oublier la conférence, en 2013, de nos amis japonais sur Fukushima ou celle en 2012 du journaliste polonais sur l'hymne de son pays ?

Cette fois, ce sera un espérantiste chinois, de Lanzhou, qui nous rendra visite. Zhang Fude a souhaité traiter deux sujets qui lui tiennent à cœur et qui ne manqueront pas de nous intéresser. Le premier sur la répression subie par sa famille chrétienne et le second sur son séjour forcé à la campagne pendant la Révolution Culturelle.



Le midi, nous mangerons «à la bonne franquette », c'est-à-dire en partageant les plats et les boissons apportés par chacun.

Le soir, en conclusion, nous dégusterons le menu de l'Abbaye.

Merci de nous retourner le bulletin d'inscription (en page 3) avant le 5 juin. Et surtout, merci de votre présence!

Zhan Fude kun sia nepino



ENHAVO

P.1 : Aux couleurs de la Chine !

P.2 : Intervjuo de A. Melnikoff

P.3 : Assemblée générale et coupon-réponse

P.4 : Rimorsoplena himno al " Rubaĵoj", kotizintoj, Nepalo

P.5 et 6 : Pierre kaj Petro, longa kaj arda agado



ALEKSANDRO MELNIKOV PRELEGIS TRIFOJE EN NORMANDIO



En H rouville St Clair, la 4 de majo

Homo konata en Esperantio kiel elstara preleganto, akademiano, instruisto kaj Interlingvisto, Aleksandro lo as en Rostov- e-Dono en Rusio, proksime de la ukraina limo.



Yves Nicolas

En Jullouville-Bouillon, la 5 an de majo

Cetere, plej multaj kluboj elektis kiel prelegtemon la nunan ruso-ukrainan konflikton. Okaze de prelego en Le Havre, Bouillon (Manche) kaj H rouville Saint Clair, ni metis al li kelkajn demandojn.



2

Y.N : De la 7a de aprilo  is la 6a de majo, vi vizitis dekkvin klubojn en Francio kaj Belgio. Sed ne nur ! Vi anka  partoprenis la Mediteranean E-aran on, kunvenon  e la sidejo de UEA, aliris Tunizion ! Eble ion plian ?  u laca post tia programo ? Kelkajn vortojn pri la plej notindaj eventoj ?

A.M : Certe, estas iom lacige  iun trian-kvaran tagon survoji. Sed interesaj renkonti oj, ekskursoj, fotinda oj (mi faris pli ol 3 mil fotojn !) superpezas. Krome, prelegado a  lecion-gvidado ne nur ne lacigas min, sed e  provizas min per aldona energio. La tuta turneo estis por mi kiel festo. Sed, eble, la plej kortu a estis momento, kiam post mia prelego pri la Ukraina krizo min aliris tri neesperantistaj personoj el Moldavio kaj Ukrainio, kiuj emocie dankis min pro la faktoj, ne facile troveblaj en la okcidentaj amaskomunikiloj.

Y.N : Kiujn prelegtemojn elektis la kluboj ? Kion vi deduktas el tiu elekto ?

A.M : Preska   iuj kluboj preferis la aktualan Ukrainian temon (ofte kun interpreto al la franca por neesperantistaj a skultantoj). E  tiuj, kiuj elektis alian temon, faris multajn demandojn pri la krizo. El tio sekvas minimume la jena konkludo : esperantistoj ja estas scivolemaj kaj pretaj a skulti opinion, kiu estas por ili neatendita.

Y.N : Kiel reagis la publiko al via prezento pri la nuna krizo ruso-ukraina ? Kiun geopolitikan signifon vi donas al tiu krizo ?

A.M : La publiko reagis per „dankon pro la vidpunktoj, kiujn ni ne imagis“.

La krizo montris malperfektecon de la nuna "mond-ordo", kie Usono pretendas esti la sola instanco, kiu rajtas decidi, kaj "la Okcidento" tre malkura e a digas sian vo on, kiam   havas alian opinion / intereson ol la "pli a a frato". Krome, la krizo montris, ke ne eblas simple ignori interesojn kaj opinion de Rusio.



Y.N : Estis via dua turneo en Francio. Kiel vi pritaksas tian aran on, kiel ni povus eventuale  in plibonigi ?

A.M : Beda rinde, mi ne povas doni al vi konsilon pri plibonigo,  ar, vere, amba foje  io estis organizita tre bone. Grandegan dankon al  iuj, kiuj kontribuis !

Le Havre, la 6an de majo

ĜENERALA ASEMBLEO EN BRIQUEBEC

LA SABATON 20an DE JUNIO EN LA ABATEJO

sortie Bricquebec 3 kms après la sortie Valognes, prendre la D 902 .



Programo :

10h00 : akcepto en la abatejo

10h30 : Unua Prelego de Zhang Fude. **"Esti kristano en Ĉinio. Travivaĵoj de mia familio"**

12h00 : Tagmanĝo

14h00 : Ĝenerala Asembleo

16h00 : Paŭzo

17h00 - 18h30 : Dua prelego de Zhang Fude : **"Mia kampara vivo dum la Kultura Revolucio"**

19h00 : vespermanĝo en la Abatejo : 15 €

Tagordo de la Ĝenerala Asembleo

- Morala kaj financa raporto
- Normanda Bulteno
- Renovigo de la estraro
- Loka agado kaj projektoj

→→

BONVOLU RESENDI TIUN RESPONDILON ANTAŬ la 5an de JUNIO

COUPON REPONSE À ENVOYER AVANT LE 5 JUIN

NOMO :

Propra Nomo :

Adreso :

Telefono :

Retadreso :@.....

Kiom da personoj ? (Combien serez-vous ?) :

Tagmanĝo : ni kune manĝos la pladojn kaj trinkaĵojn kiujn la partoprenantoj alportos. Midi, nous partagerons les plats et les boissons apportés par les participants.

Vespermanĝo : Ĉu vi partoprenos la vespermanĝon de la Abatejo (15 €). Participerez-vous dîner de l'Abbaye ?

Jes :

Ne :

Tranoktado : Eblas tranokti ĉe la Abatejo (15 €). Nous préciser si vous souhaitez dormir à l'Abbaye et à quelle date.

Sendu tiun respondilon/Coupon à adresser à : **Anne-Marie Leprévost, 62 rue 11^{ème} d.b. Britannique. 61100 Flers**

Pour les personnes prenant le dîner à l'Abbaye : joindre un chèque de 15 € au nom de « Esperanto Normandie »

Nun de iom mallonge
Mi ekkonscias honte,
Kun retroa konsterno
Pri terurega fakto.

Por nutri mian korpon
Mi devis preni vivon,
Sekve de diaj leĝoj,
De multnombraj estaĵoj.

Ili ja ne kapablis
Al mi komuniki
Kion ili sentadis.
Tamen eblas imagi !

Sub forko kaj tranĉilo,
Ungaĉoj kaj dentaro,
Ili verŝajne tremis,
Veis, kaj hororiĝis.

Ĉu mi mem ne hirtiĝus
Se iam matenmanĝus
Per mia kara karno
Senkompata leono ?

Sed ne estas la tuto !
La pokalon de honto
Ĝis la feĉo mi trinku,
Kaj mi ĉion konfesu !

De mia propra korpo.
Mi mem altege taksas
Ĉion, kiu troviĝas
En la arkitektur

De ĝi, nenio ero
Malindas je atento,
Estu ostopeceto,
Ungo, haro, tendono ...

Sed mi, de manĝebluloj,
Mi tute senpripense,
Disdividis duparte,
la mirindajn organojn !

Por mi tiuj mirakloj,
Estis, ĉu manĝeblaĵoj,
Ĉu nur forĵetindaĵoj
En mian rubaĵujon !

O vi ! Buĉoferitoj
Por mia pluvivado,
Se de vi en ĉielo
Restas nanospureto,

Sciu ke mi rimorsas,
Ke al vi nun mi pensas,
Petas vian pardonon,
Kaj ... persisti permeson

€..... **Kotizintoj 2015 ĝis la 15a de aprilo :**

14 : Cottin, Dubois, Fortin, Gibert, Groult, Langeois, Lardeur, Lebreton, Ledron, Leperd, Longuet, Marie, Nicolas, Paumier, Rousseau, Sauvage, Sénécal

27 : Maurau

50 : Gascoin, Lévesque, Martial, Robiolle, Schertzer

61 : Leprévost

76 : Caron, Chalm, Colombel, Dufeu, Dufresne, Duval, Evrard, Guérault

Lemarchand, Pottier, Quillaud, Sery

Eksternormandio : Girard, Jourdenne, Loisel, Thierry

La kotizontoj bonvolu sendi sian ĉekon (8 €) al Jean Colombel (la adreso troveblas ĉe la frontpaĝo)
les personnes qui voudraient cotiser peuvent envoyer leur chèque (8 €) à Jean Colombel dont
l'adresse est en 1ère page.

.....€

Mukunda Pathik el NEPALO prelegis en Normandio antaŭ kelkejn jarojn. Li sendis mesaĝon transdonitan de Hori Jasuo.

"Mi fartas bone kun mia edzino. Ni estas en tendaro kun najbaraj geamikoj. Multaj homoj perdis sian vivon kaj domon kun multaj tradiciaj belaj konstruaĵoj. Ni menso estas timemaj...."

HELPU NEPALON !



PIERRE kaj PETRO , longa kaj arda agado

La dekan de marto, ni havis rendezuon ĉe Claudine kaj Pierre Pottier, en Yvetot, kun Marie-Thérèse kaj Pierre Quillaud. Claudine kaj Pierre tre afable akceptis nin por agrabla tagmanĝo kiun ankaŭ partoprenis Maryse kaj Pierre Lemarchand. Ni malfermis plenplenajn valizojn da dokumentoj, fotoj, flagetoj, standardoj, malnovaj libroj, antikvaj revuoj kiuj atestas pri longa kaj arda agado por esperanto.



Figure 1 Pierre, Petro, Marie-Thérèse, Claudine

Pierre Pottier kaj Petro Quillaud naskiĝis la saman tagon, la unua en Fécamp kaj la dua en Nantes. Tre certe, tiun 2an de aprilo 1928, blovis en tiuj urboj favora kaj esperplena vento aŭ, se vi preferas, flugetis bonanima kaj efika feino kun verda steleto super iliaj luliloj ĉar tiuj samaĝaj homoj baldaŭ samenergie uzis, propagandis, instruis esperanton. Ambaŭ senlace estris kaj kontribuis al nia regiona asocio kiel prezidento, sekretario, redaktoro, kasisto.

Pierre Pottier, kies patro estis esperantisto, lernis la lingvon kiam li estis liceano, en Fécamp, kun S-ro Bosc (longe prezidanto de la normanda unuiĝo) kiel instruanto. Li baldaŭ fariĝis tre agema en la loka e-o societo kaj prezidis ĝin ekde 1951 kiel atestas multaj artikoloj el la tiama loka gazetaro. Pierre instruis la internacian lingvon al multaj homoj en Fécamp, inter ili, al Ernest Permanne kiu siavice ĝin instruis al nia nuna regiona kasisto Jean Colombel. Semu, semu, por iam rikolti !



Figure 2 Pierre intervenas dum SAT-Amikara kongreso 1971

En 1959, li edziĝis kun Claudine kiu lernis e-on en 1947 (ŝia bo-patro, François Casamayor, hispano, estis esperantisto). En 1964, la paro translokiĝis al Yvetot kie Pierre instruis la anglan lingvon kaj organizis ĉiu-semajnan kurson de e-o en Maison des Jeunes (sekvis ĝin Maryse, la onta edzino de Pierre Lemarchand) kiu daŭris ĝis proksimume 2010. La loka klubo fariĝis tre aktiva, akceptis normandan kongreson kaj en 1971 la kongreson de SAT-Amikaro. Claudine kaj Pierre dediĉis multe da tempo kaj energio por esperanto kiu havas plu grandan lokon en ilia koro.

Y.N

Mia patro estis internaciisto, pacisto, aktivulo en sindikato sed li neniam deziris membriĝi al politika partio. Rusa revolucio estis grava evento en lia vivo sed li neniam kredis ke Paradizo ekzistas tie. Mi tre amis lin, ne dubis pri sincereco de liaj konvinkoj kaj mi estis sendube influata de li. Do, en 1938 (mi estis 10-jara) mi vidis afiŝojn anoncotajn pri malfermo de Esperanta-kurso en mia tiama naskiĝurbo, Nantes. Kvankam juna (infano) tiu anonco intrigis min kaj mi petis mian patron klarigi la aferon. Li bone konis la problemon kaj li provis klarigi al mi « Kio estas Esperanto ». Li estis simpatianto sed neniam trovis tempon por studi la lingvon.

Forpasis la jaroj kaj profesiaj motivoj devigis mian patron labori en Rouen. (Li devis rekonstrui pontojn detruitajn, en 1940, de franca armeo, por malebligi al germana armeo preterpasi riveron Sejnon !!!) Post trovado de loĝejo, mia patrino kaj mi alvenis en Normandion ; tie ni restis dum la militaj jaroj.



Poste, rekomencis normala vivo kaj esperantaj kluboj reaktiviĝis. Mi mem sopiris al libereco kaj estis tre legema. Vizitante librovendejon, mi foliumis multajn revuojn kaj librojn kaj trovis libreton « L'Esperanto en 10 leçons » de Pierre Delaire. Mi aĉetis ĝin kaj faris senpene la ekzercojn. Tamen, mi trovis la metodon tro simplan kvankam tre logikan.

Unu aŭ du jarojn poste, mi aĉetis ekzempleron de revuo « Jeunesse ». Tiu semajna gazeto estis organo de socialista junularo kiu aperigis regulan poresperantan rubrikon kun adreso de perkoresponda kurso. Mi do skribis kaj aliĝis al la kurso. Mia profesoro sendis « Cours rationnel et complet d'Esperanto ». Mi sendis al li taskojn korektotajn. Eraroj estis tre maloftaj kaj lingvo aspektis al mi pli facila ol angla lingvo kiun mi studis en lernejo.

Mi estis 19-jara. Unu jaron poste, mi estis soldato kaj estis sendata en Germanion al Lindau-Bodensee, regiono tre turisma, ne detruita pro milito. Mi tie kontaktis Germanojn kaj ankaŭ loĝantojn el urbo Villingen ĉar estis indikilo en stacidomo pri ekzisto de klubo. Esperanton mi do provis kun Germanoj kaj mi perfekte komprenis ilin.

Artikoloj aperintaj en revuo « Jeunesse » estis redaktitaj de SAT-ano. Mi do tuj aliĝis SAT kaj SAT-Amikaro-n. Mi devas diri ke tiam rilatoj inter « neŭtraluloj » kaj « laboristaj » esperantistoj ne estis ĉiam tre bonaj. Nuntempe, situacio estas tute alia kaj konfliktoj preskaŭ malaperis. Situacio evoluis kaj vivkondiĉoj ŝanĝiĝis. Kio plaĉis al mi ĉe SAT estis ideoj de Lanti kiuj kontraŭbatalis naciistajn ideojn. Necesas diri, ke tiam, post milito, ekzistis patriotisma sento malagrabla. (Filozofio de Lanti eble efektiviĝos ...post kelkaj centoj da jaroj !)

Ne ekzistis SAT grupo en Rouen ; mi do kontaktis neŭtralan grupon. Tie mi renkontis simpatiajn gesamideanojn Jouis, Parrington, Paule Loison kaj multajn aliajn kies nomon mi forgesis.

Iam Sinjorino Paule Loison kiu estis kursestrino serĉis anstataŭanton kaj mi ne povis rifuzi ; mi do gvidis kurson en Rouen , en Sotteville, en Grand Quevilly kaj en diversaj lernejoj de rŭena regiono. Multaj studis sed multaj malaperis kaj ne integriĝis al esperantista vivo. Eble, instruinto ne estis sufiĉe kompetenta por interesi ilin ! Tamen , mi povas fieri ke kelkaj lernintoj miaj sukcesis fariĝi eminentuloj en sia regiono !

Mi fariĝis membro de normanda esperantista asocio kaj konatiĝis kun aliaj geamikoj : Gibeaux, Bosc, Huet...

Amikaj kunvenoj okazis ĉe hejmo de diversaj aktivuloj. Dum tiuj kunvenoj , ni diskutis pri evoluo de nia asocio, pri estontaj Ĝeneralaj kunvenoj , pri nia regiona bulteno, pri vivo de niaj kluboj , pri lingvaj staĝoj , pri naciaj kaj internaciaj kongresoj ktp ... Mi mem organizis kongreson de SAT-Amikaro en Rouen ; alia kongreso de sama asocio okazis en Yvetôt ; mi helpis Yves Nicolas organizi kongreson en Hérouville, en 1993.

Tiam ekzistis du normandaj asocioj :

- Union des Espérantistes de Normandie kiu celis regroupigi ĉiujn esperantistojn
- Fédération Normande des Centres culturels Esperanto rezervita por membroj de U.F. Pro tio ke ambaŭ asocioj havis saman celon kaj multaj homoj estis membroj de la du asocioj, ni decidis solvi tiun ridindan situacion. Nun, estas nur unu asocio « Esperanto Normandie ».

Resume, Esperanto alportis al mi kaj al mia edzino multan plezuron. Ni vizitis kaj akceptis eksterlandanojn el multaj landoj. Ni havis geamikojn el Kroatio, Rusio ...Sen Esperanto, tiuj kontaktoj ne povus ekzisti. Ni intencas partopreni Universalan Kongreson en Lille, ĉi-somere, ĉar tiu urbo situas proksime de Rouen. Mi tre bedaŭras ke politikestroj rifuzis konsideri la valoron de Esperanto kaj sin klinis antaŭ la forto de imperialista lingvo.

Petro KIJO

ĜIS LA ĜENERALA ASEMBLEO !